

*Senlime*

Esperanto-Asocio en Euxregiono Mozo-Rejno

En cas de non-distribution, renvoyer à

H. Lentzen  
Feldweg 20  
BE-4701 KETTENIS  
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26  
E-mail : [lentzen@senlime.org](mailto:lentzen@senlime.org)

**Editeur responsable**

**Responso eldonanto +**

**Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters,

BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**

**Informoj en la nederlanda:**

Tel. Xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: [parren@senlime.org](mailto:parren@senlime.org)

P.H.H. Parren, Heimansstr. 16

NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**

**Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: [hogen@senlime.org](mailto:hogen@senlime.org)

K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43

DE-52134 HERZOGENRATH

Informilo aperanta kvarfoje en jaro.

**Jara abono / allgxo : 10 EUR**

**Belgio** : konto 000-0245571-64

IBAN: BE29 0000 2455 7164

BIC: BPOTBEB

Esperanto-Grupo, rue Donckier 22,

BE-4800 VERVIERS

**Nederlando** :

ni bedaŭrinde devas peti vin ke vi provizore bonvolu uzi alian konton.

**Germanio** : konto 6623201,

Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000)

Im Pesch 20

DE-52134 HERZOGENRATH

Kotizoj do principe pagendas dum la novjara periodo (decembro aux januaro). La kotizintaj membroj principe gxuas rabaton okaze de aligxo al Trilanda Renkontigxo organizita de *Senlime*.

Jarkolekto : 2005

Numero : 2

Pagxo : 1

# La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

## Trilanda renkontigxo

### *Senlime*

invitas vin al

## Trilanda Renkontigxo en Stavelot-a Abatejo

Dimanĉxon, la 22an de majo 2005.

### Programo :

- 09h30 Malfermo de la akceptejo (en la muzea trinkejo).
- 10h00 Akcepto per bonveniga kafo.
- 10h30 Vizito de la muzeo pri la Princlando Malmedy-Stavelot.
- 12h30 Tagmangxo (prizorgota de « Hotel d'Orange ») : legoma kremajxo-meleagrina rostajxo-cxokolada muso.
- 14h00 Vizito de la muzeo pri la auxto-vetkurejo Francorchamps.
- 15h00 Laux via placxo : gvidita promenado tra Stavelot aux vizito de la muzeo pri Vilhelm Apollinaire (Apoliner).
- 16h00 Mangxeto (1 torta peco + 1 kafo) kaj disigxo.

**Prezo : 25 EUR** – trinkajxo neenkalkulitaj  
krom akcepta kaj fina kafo.

- Kutima rabato da 20 % nur por
- kotizintaj (post 2004/06/30) membroj de *Senlime*
- infanoj kaj junuloj < 26 jaragxaj.

### **Bonvenon al cxiuj !**

Sed... atente legu la detalojn interne :

- Deviga rezervado kaj pago **antaux la 8an de majo 2005**.
- Grupa prezo postulas saman programon (mangxo,...) por cxiuj.
- Auxdvidaj muzeoj vizitendaj per kapauxskultila gvidado en la lingvoj FR-NL-DE kaj EN (tradukado al esperanto neebla).
- La muzeaj vizitoj eblas por rulsegxantoj.
- Akompanaj bestoj estas malpermesataj.

# ESPERANTO

## Euxregiona kalendaro 2005 (1)



**Senlime** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-arangxo en la Euxregiono Mozo-Rejno. Gxi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontigxoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aux esperanto-grupo en Euxregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj auxtune), lauxvice en cxiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-cxi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aux aktivajxojn organizitajn aux subtenitajn de komitatanoj. Gxi neniel igxu kompleta kalendaro de esperanto-arangxo (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas cxiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, cxiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro : Jean-Marie Jacques ([jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)).

**01-21** 19h30 BE-Kelmis, Select: Marcel **Delforge** parolos pri ***Kelkaj falsaj amikoj kaj paronimoj en Esperanto-lingvo.***

**02-18** 19h30 BE-kelmis, en la «Patronage», str. de la Patronage: José **Jacob** prelegos pri ***Termessos, urbo de Turkio.***

**03-18** 19h30 BE-Kelmis, Select: Mathieu **Schrymecker** plikonatigos nin kun ***Genealogio.***

**04-15** 19h30 BE-Kelmis, Select: ***Kiel plibonigi sian memoron*** sciigos al ni Klaus **Hogen**.

**05-20** 19h30 BE-Kelmis, Select: al **Katmandu** (Nepalo), portos nin Marie **Daenen**.

**05-22** 9h30 BE-Stavelot (lama Abatejo): Trilanda Renkontigxo (antauxpago kaj rezervado necesaj - vidu al unuan pagxon).  
Inf. Jean-Marie **Jacques**.

**06-26** 19h30 BE Partopreno de Senlime en APE pikniko (dato, loko kaj temo decidotaj).  
Inf. Marcel **Delforge**.



Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, okazos la: **07-15, 08-19, 09-16, 10-21, 11-18** kaj **12-11** (Z-festo).

**01-21** 19h30 BE-Kelmis, Select: Marcel **Delforge** parlera dei ***Quelques faux amis en paronymes dans la langue Espéranto.***

**02-18** 19h30 BE-kelmis, au «Patronage», rue du Patronage: José **Jacob** frea une conférence sur ***Termessos, ville de Turquie.***

**03-18** 19h30 BE-Kelmis, Select: Mathieu **Schrymecker** nous familiarisera avec la ***Généalogie.***

**04-15** 19h30 BE-Kelmis, Select: Klaus Hogen nous fera savoir ***Comment améliorer sa mémoire.***

**05-20** 19h30 BE-Kelmis, Select:: Marie **Daenen** nous portera à Katmandou (Népal)

**05-22** 9h30 BE-Stavelot (abbaye): Rencontre des trois pays (réservation et paiement préalables nécessaires – voyez la première page).  
Inf. Jean-Marie **Jacques**.

**06-26** 19h30 BE Participation de Senlime au pic-nique annuel d' APE pikniko (date, lieu et thème à décider).  
Inf. Marcel **Delforge**.



Réunions suivantes au Sélect, La Calamine (BE), les: **07-15, 08-19, 09-16, 10-21, 11-18** et **12-11** (fête Zamenhof).



Nepre partoprenu nian majan trilandan renkontigxon en

## STAVELOTa-ABATEjo

Atente legu cxi-sube cxiujn utilajn informojn.

### Pri la intereso kaj prezo

Cxiam trovigxas inter esperantistoj iuj, kiuj opinias ke la postulita prezo estas tro alta, aux ke la arangxo ne estas suficxe «esperantista».

Kial mi partoprenus tian aferon, se mi povos mem, samkoste aux ecx pli malmultekoste, fari tion per miaj propraj rimedoj kaj mia propra lingvo... ?

Fakte, bonvolu memori ke jam de pli ol dek jaroj, multaj spertas « psikologian » sojlon kaj opinias ke pli ol 1000 BEF (25 EUR) por unutage arangxo estas tro.

Tamen cxiuj devas konsscii ke, dum dek jaroj ekzemple, la prezoj suficxe kreskas. Estas certe ke tio, kio kostis 25 EUR en 1995, nun kostas 30 EUR aux pli. Ankaux esperantistoj ne povas fari miraklojn !

### VIAJ AVANTAGxOJ ?

Okaze de nia "trilanda renkontigxo" profitu el esceptaj eblecoj :

- rabatita prezo (grupa)
- gvidita vizito de Stavelot en esperanto
- cxeesto de multaj esperantistoj diversnaciaj (komuna tagmangxo,...)
- dokumentoj kaj helpo en esperanto, ...

N-B : ne eblas prizorgi la kapauxskultilan gvidadon (nepre por plene gxui pri la vizito) en esperanto. Pro tio – felicxe kaj kompense - profitdona partopreno de ne-esperantistaj akompanantoj (inkluzive de infanoj) tute eblas.

Jen niaopinie kelkaj bonaj kialoj por nepre pasigi tiun tagon kune !


Ankaù memoru ke ni ankaù zorgeme atentis pri nia 'Senlime'-reputacio kaj cxiam postulas kvaliton: for la nevizitindaj lokoj, la amatorajxoj, la acxaj amaslogxejoj, k.t.p. (**Senlime** al la kvalito !).

Jam hodiaux sendu vian aligxilon kaj vian kontribuon...

Do :

***Koran inviton al cxiuj, esperantistoj aux ne !***

### Situo



### Aliro

#### **El Nederlando, Liegxo aux Germanio**

Auxtovojo E40 Liège poste E42 direkte al Verviers-Prüm, elirejo 11 (Malmédy) poste sekvu la direkton al Stavelot.

#### **El Luxemburgo**

Auxtovojo E25 elirejo 48 Werbomont, elirejo 49 Manhay, poste sekvu la direkton al Stavelot (atentu : nuntempe gravaj laboroj cxe tiu auxtovojo).

#### **Per trajno, el Liegxo (NEKONSILINDE : informigxu cxe TEC kaj SNCB pri eventualaj horar-sxangxo)**

Liège-Guillemins : foriro je la 9h16 al Luxembourg.  
Alveno en stacidomo Trois-Ponts (apud Stavelot) je la 10h10.  
Foriro per la TEC-buso n°45a je la 10h30 al Manderfeld (Stavelot je 10h38).

**Informoj (FR-NL-DE-EN) :** <http://www.abbayedestavelot.be>


**Espaces Tourisme & Culture** BP 52 - BE-4970 Stavelot

Telefono : +32 (0) 80/88.08.78

Telekopioj : +32 (0) 80/88.08.77

Malfermas cxiutage de la 10h gxis la 18a h. Fermita lunde.

# MAPO DE LA STAVELOT-a CENTRO



# Aligxilo al Trilanda Renkontigxo Stavelot 2005/05/22

Cxiu aligxanto nepre kompletigu apartan dokumenton (aux fotokopion) kaj alvenigu gxin antaux la 8an de majo cxe Jean-Marie **Jacques**, 5 rue Wauters, BE-4800 VERVIERS, ☎ xx-32-(0)87/33.02.92. Forstreku la nevalidajn menciojn kaj krucumu la elektitajn alternativojn.

S-ro/S-ino/F-ino: \_\_\_\_\_  
 Naskigxdato: familia nomo (por alfabeto ordigo)

\_\_\_\_\_  
 jaro monato tago antauxnomo aux persona nomo

Adreso: \_\_\_\_\_  
 strato kaj numero

\_\_\_\_\_  
 landa / urba kodoj

\_\_\_\_\_  
 urbo

\_\_\_\_\_  
 tel. n-ro (kun zona prefikso)

\_\_\_\_\_  
 faks. n-ro (kun zona prefikso).

e-adreso : \_\_\_\_\_ @ \_\_\_\_\_

- legis, komprenis kaj aprobas la invit-kondicxojn<sup>(1)</sup> de **Senlime**,
- aligxas al la **Trilanda Renkontigxo** en Stavelot-a abatejo, la 22an de majo 2005 kaj do **hodiaux** antauxpagas la devigan kaj nerepageblan aligx-kotizon da :

25,00 EUR                          20 EUR pro rabato (20 %)

Al la konto 000-0245571-64 de Esperanto-Grupo, rue Donckier 22, 4800 VERVIERS  
 IBAN: BE29 0000 2455 7164                          BIC: BPOTBEB1

Al la konto de **Senlime**: 6623201, Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000).

**Rabaton** da 20% (5 EUR) gxuas **NUR** junuloj (<26 j.) kaj (post la 30a de junio 2004) kotizintaj membroj de **"Senlime"**.

- deziras ricevi vian trimonatan informilon **«Senlime»**:  
 per ordinara **posxta** sendo, surpapere (membrigxo tiam deviga)  
 ene de la revuo de **APE/Liege-Esperanto** («Inter ni», kiun mi abonas)  
 per legado/telesxargo el la **retaj** pagxo de **Senlime** (<http://www.senlime.org>)  
 per mia propra sistemo (**«Senlime» NE** estu sendita al mi persone).

N-B: estas notinde, ke **Senlime** mem ne praktikas grupajn sendajxojn aux similajn sistemojn.

Dato: \_\_\_\_  
 jaro        monato    tago

Subskribo:

**(1)** La aligx-kondicxoj estas detale priskribitaj en la n-ro 2005-2 de la informilo de **Senlime**

## Antaŭnelonge elfositaj kaj komprenebligitaj por la profano, la ruinoj de la abateja preghejo el la 16a jarcento estas enlistigitaj inter la 159 eksterordinaraj Valoniaj havajhoj.

### La modernigo

La shlosila konstru-periodo estis la regno de la abato Poppon. Tiuepoka plano de preghejo samtempe monakeja kaj pilgrima postrestis ghis la fino de la 18a jarcento. Antaŭenigita de impona turo, restaŭrigita en 1534 sed pri kiu postrestas nur la teretago preskaŭ 15 metrojn alta, la navo (parte traserchita) kondukas al la monaka korejo kaj al la korejo rekonstruitaj dank'al arkeologiaj serchadoj.

Post kiam vi estos vizitinta la muzeon pri la princlando kaj virtuale enirinta en la abatejan preghejojn dank'al la novaj 3D (tridimensiaj) teknologioj, vi povos reale promeni de la transepto al la korejo, de la navo al la kripto por senti la imponan cheeston de la muregoj malaperintaj post la franca revolucio.

La abatejo estas tute renovigita de la Valonia Regiono inter 1999 kaj 2002 por monsumo da 16.000.000 €. La arkitektoj redonis al la monakaj konstruajhoj ilian klostron, interalie konstruante novan alon el vitro kaj neoksidebla shtalo, sur la fundamento kaj laŭ la dimensioj de la kvara alo detruita post la franca revolucio.

Konservante la kolektojn de la antaŭaj Stavelotaj muzeoj sed ankaŭ uzante la plej modernajn scenografiajn kaj multimediajn teknikojn, tri novaj pasiigaj muzeoj estas inaŭguritaj la 29an de marto 2002 : la muzeo pri la princlando Malmedy-Stavelot, la muzeo pri la aŭtomobila kurejo en Spa-Francorchamps kaj la muzeo pri Vilhelmo Apollinaire.

### Muzeo pri la princlando

Dum pli ol unu jarmilo, de ghia fondigho far' Sankta Remaklo ghis la Francia revolucio, la abata Princlando Stavelot-Malmedy ekonomie, politike, religie kaj artiste influis vastan teritorion translimen de Belgio, de la rivero «Loire» ghis la germania Imperio.

La Muzeo pri la princlando Stavelot-Malmedy proponas samtempe modernan, inteligentan kaj *ludeman* vojadon tra la miriga historio de unu el la Shtatoj de la t.n. «malnova reghimo». Iamaj ikonografioj kaj muzikoj, artefaktoj kaj artajhoj estas scioplene orkestritaj per la *plej novaj multimediaj teknikoj*. Post tiu vizito, la abata preghejo apuda kaj elfosita de la arkeologoj montras sian tutan signifon.

### Muzeo Apollinaire

Vilhelm Apollinaire, tiam dek-naŭ agha, ferias en Stavelot, kiam lia patrino, aristokrata kaj pola, frekventas la kazonon en Spa. Tiu somero 1899a konsiderinde influis lian verkaron.

Le Muzeo pri Vilhelm Apollinaire elvokas la restadon de la poeto en la regiono kaj enmergas la vizitantojn en la artas universon de la aŭtoro de la "Kanto de la Malbone amitulo". Inica trairado en la kultita verko de signinta personeco el la lasta jarcento, tra liaj skribajhoj kaj la rigardoj de Picasso, Chagall, Zadkine, Cocteau, Marie Laurencin, ...

Dokumenta centro disponigas pli ol 1000 libroj de aŭ pri Apollinaire al la lernantoj kaj serchantoj (rendevuo deviga).

Forlasante la abatejon, la vizitanto povos tra Stavelot sekvi promenadon Apollinaire kiu nepre konduku lin sur la spuroj de shia «amora» Stavelotanino, Marie Dubois, kaj al la iama gastejo Constant kiun li «lign-sonorile» [à la cloche de bois = nepaginte] forlasis, hodiaŭ la restoracio «Al la malbone amata» [O Mal Aimé] penetrita de la spirito de la poeto.

### Muzeo pri la kurejo

Kaŭrighanta en verdajha juvelujo inter Stavelot, Malmedy kaj Spa, teatrejo de tiom da aŭtomobilaj kaj motorciklaj grandfaroj, la kurejo en Spa-Francorchamps daŭre estas konsiderita de multaj kondukistoj kiel «la plej bela kurejo en la mondo».

En la belegaj volbigitaj keloj de la abatejo, la muzeo rakontas la prestighan historion de la kurejo. Neeldonitaj vidaj dokumentoj, instruaj paneloj kaj senchese renovigita kolekto da esceptaj veturiloj priskribas la pasion por la vetkurado, de la pioniroj ghis hodiaŭ : Ferrari, March, Chevron, Porche, Cooper, ...

Ne nur la «Formulo 1», sed ankaŭ la epopeaj «24 horoj» por motorcikloj kaj veturiloj, chi-tie prenas novan dimension. La «Fraŭlinoj el Herstal» nostalgie elvokas la glorajn horojn de la Lieghaj industrioj : FN, Gillet kaj Saroléa.

Granda maketo kaj lud-aparatoj «*Playstation 2*» igas la kurejon pli konkreta al la shatantoj.

El kvarlingva ttt-ejo de la Abatejo: <http://www.abbayedestavelot.be>